Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo) エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Maĉida-anoj ope vizitis nin



La 9-an de septembro, 8 membroj el Esperanto-Klubo de Maĉida vizitis nian Esperanto-Muzeon Jokohaman, kaj havis bonan tempon kun 7 el niaj membroj (— La urbo Maĉida situas najbare al la urbego Jokohamo). Tio estis la plej multopa vizito al nia muzeo de nemembroj.

La grupo, kun s-ro Kimura Goro Christoph, la estro ( — Legu lian impreson sube), iom post la tagmezo alvenis al ni, haste spektis la 2-an etaĝon, kaj sidiĝis en la unua etaĝo por lunĉo kun niaj membroj, prezentante sin reciproke. Poste, s-ro Doi Hirokaz prezentis la muzeon, kion kompletigis aliaj membroj. Oni detale alrigardis la prezentaĵojn en la 1-a etaĝo, kaj poste en la 2-a etaĝo. Post la 3-a horo estis te-kunsido en la 1-a etaĝo kaj oni disiĝis. (Sibayama Zyun'iti)

## Vizito al la (ad)mirinda Esperanto-muzeo

KIMURA Goro Christoph

Finfine venis la tago viziti la Esperanto-muzeon en Jokohamo.

Ni maĉida-anoj kolektiĝis ĉe stacidomo Idogaja kaj kune piediris al la muzeo. La muzeo troviĝas en iom kaŝita loko, sed s-ro Doi jam atendis nin ekstere, tiel ke ni povis esti certaj, ke ni atingis la ĝustan lokon.

Tuj ni havis okazon trarigardi la ekspozicion. Laŭ tiu ĉi sperto, la avantaĝo de la jokohama muzeo estas, ke male ol en kutimaj muzeoj, la eksponaĵoj ne estas en vitrinoj. Do, oni havas rektan kontakton kun la objektoj kaj povas mem enrigardi en la librojn kaj gazetojn. Aparte menciindas la kolekto de materialoj pri individuaj japanaj esperantistoj. Tio estas specialaĵo ne trovebla en aliaj bibliotekoj. Espereble tiu kolekto pligrandiĝos estonte. Post la gvido tra la muzeo ni havis agrablan tempon interbabili kun jokohamanoj.

Laŭ mia impreso, la muzeo povas plenumi almenaŭ jenajn tri funkciojn:

1. Montri al la „ekstera mondo" la riĉecon de la kulturo de Esperanto.
2. Kiel konsultbiblioteko helpi esploristojn kaj aliajn interesitojn.
3. Okazigi prelegojn aŭ seminariojn pri temoj rilataj al la eksponaĵoj aŭ specialaj ekspozicioj.

Ĉar la valoro de la trezoroj troveblaj en la muzeo ne estas komprenebla por tiuj ne familiaraj pri la esperanta kulturo kaj historio, estus bele oferti gvidadon por diversaj grupaj vizitantoj. Nia vizito montris, ke la muzeo povas esti bona ekskurscelo por Esperanto-rondoj.

Mi tutkore dankas al la prizorgantoj de la muzeo pro la varma akcepto kaj esperas daŭran evoluon de la muzeo!

Esperanto Jokohama

■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)
■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

## La 129-a Legokunsido

En la 1a de julio 2023 okazis la 129-a legokunsido por "Sur bluaj planedoj" de Laure Patas d'Illiers. Partoprenis 5.

# “Sur bluaj planedoj” de Laure Patas d’Illiers — fantazio kun parta realo —

Sibayama Zyun’iti

Jam por pluraj jardekoj, ni kutimis nomi la Terglobon “la blua planedo”, ĉar la kosmonaŭtoj nomis ĝin tia, spektante ĝin de la orbito. Sed kie estas pluraj “bluaj planedoj”? Jes, la libro priskribas multajn bluajn, aŭ hom-loĝatajn/loĝeblajn planedojn kien terglobanoj vizitas. Nome la libro estas novelaro de sciencfikciaĵoj, eĉ 22, de duonpaĝa ĝis dekkelkaj paĝoj, de franca aŭtorino.

En la unua duono, temas ĉefe pri aliplanedaĵoj, tipe SF-ecaj kaj humuraj, kaj la posta duono okupas lokon, videble en “nia” planedo, tipe socikritikaj.

Mi elektu unu ekzemplon el la unua duono: “Korpaj ornamaĵoj”. La rakonto memorigas al mi du fabelojn: “Hansel kaj Gretel” de Grimm, kaj la japanan “Restoracio Multemenda” de Miyazawa Kenzi. En la unua, geknaboj estas traktitaj bone por dikiĝi, por esti manĝotaj. En la dua, vojerarintoj estas petataj spici sin, por esti manĝotaj. En la nomita rakonto, terglobanoj atingintaj alian planedon estas fastigitaj, por esti … Nu, mi preskaŭ malvualigis la rakonton, kaj ĝi estas al mi plej plaĉa elnodiĝo.

El la dua kategorio, mi elektas “Alaŭdo kantas”. La rakonto temas pri socio, pli AI-igita, kun du tavoloj da homoj: engaĝitaj al socio, kaj dizertintoj, perdintaj laboron pro AI tamen vivantaj. Tion legante, mi rememorigas al mi la 1930-an verkon “Kazohinio”. En tiu verko, elitaj homoj nome “hinoj” senpene vivas, dum malelitaj homoj nome “behinoj” aĉe vivas. Nu, la scenoj en “Alaŭdo kantas” estas facile imageblaj al ni kun AI, kaj mi des pli miras je la imagipovo de Sandor Szathmari en 1930-aj jaroj pri la Kazohinio (Legu mian artikolon en la aprila n-ro 384).

Alia por mi interesa rakonto de la posta duono estas “Ĉe tiaj uloj”. Ĝi estas nomebla kiel SF, ĉar en ĝi dato estas montrita: 2030. Sed la enhavo estas tute hodiaŭa. Ĝi estas polic-novelo, kaj la delikto ja povas okazi hodiaŭ. Kaj la kaŭzo de la krimo ne estas SF-eca, sed delira hodiaŭecaĵo, nome homgrupo kun sia firma kredo.

Resume, la libro estas inde legebla kiel fantaziaĵo ĝenerale, kaj tute realaĵo por kelkaj pecoj, jam en la nuna socio kun Artefarita Intelekto.

# Pri “Alaŭdo kantas”

Akiya Hideo

La sciencfikciaĵo “Sur bluaj planedoj” de Laure Patas d’Illiers estas la dua de la 6 esperantaj libroj, kiujn mi jam legis ĉi-jare. Ĝi konsistas el ĉirkaŭ 20 mallongaj rakontoj. Por legi ĝin mi bezonis preskaŭ monaton, de la fino de januaro ĝis la fino de februaro. De tiam pasis ĉirkaŭ duonjaro, do mi efektive jam forgesis preskaŭ tutan enhavon de la libro. Tial mi relegis kelkajn novelojn por la septembra legokunsido. Nun mi parolas pri nur unu el ili, “Alaŭdo kantas.”

Kiam mi ĝin legis la unuan fojon, mi havis la impreson, ke temas pri la socio en proksima estonteco. Sed post lerninte la aktualan disvolviĝon de la artefarita intelekto AI, kiu aspektas ĝuste homa intelekto, nun mi trovis, ke la novelo estas ja karikaturo de la nuna situacio de la mondo.

En la rakonto aperas adoleskantino Eva. Ŝia familiano, aparte patrino, ĉiam demandas ŝin

kiom da poentoj ŝi ricevis tiutage, kaj urĝas ŝin plu studi diligente. Se ŝi faradas malbone en ekzamenoj, tio malebligos al ŝi estontece akiri laboron.

En tiu socio multaj laboroj jam estas okupataj de AI, kaj malmulte da profesioj restas al homoj. Nur la "postenuloj," kiuj sukcese atingis alte postulatan nivelon en ekzamenoj, povas havi laboron. Eva estas filino de postenulaj gepatroj.




Ceteraj homoj estas rigardataj nenecesaj por funkciigi la socion. Ili vivas senlabore kaj dependas de la socia sistemo UBE (universala baza enspezo). Ili estas UBEuloj. "Esti nutrata, loĝata, ricevi sian UBEn, tio al ili sufiĉas..."

Eva estas inteligenta knabino, ŝia patro diras. Sed ŝi ne ŝatas studi, ne havas plezuron en lernejo. Ŝi ŝatas muzikon, amas kantadon, kiun ŝi kaŝe lernas per la lerneja komputilo anstataŭ studi la devigatajn studojn. Eble pro tio ŝi ne havas tre bonajn notojn en la lernejo.

Iam, pro sia scivolemo, Eva eliris de sia loĝbloko kaj vizitis la loĝblokon de UBEuloj. Tie ŝi renkontis bonkoran maljunulinon Magi, kaj iom eksciis la vivon de la UBEulo. Laŭ Magi, "oni diras, ke ĉiuj havas egalajn ŝancojn, sed ŝiaj infanoj eĉ ne provas."

Junuloj en la rakonto emas esti pigraj, sencelaj, aŭ ne sendependaj de la socio. Ĉu la socio apogata de plene servemaj AI malbonigis aŭ malstimulis la volontecon de la homoj?

Ŝi tranoktis ekstere en iu parko, kie ŝi kantis. Iuj junuloj aplaŭdis ŝian kantadon, sed ili taksis, ke ludi muzikon por publiko estas senvalore. Certas, ke "kanti, muziki, komponi, ĉion ĉi la AI faras pli lerte ol ni homoj."

Tamen ŝi kantis en la parko pro plezuro. Rigardante la ĉielon, ŝi trovis, ke "super ŝi, pluraj birdoj triladas. Ili tute ne bezonas publikon por kanti. Nur por si mem ili kantadas." Kaj fine ŝi konfirmis sian volon. "Ŝi volas lerni muzikon. Ŝi volas fariĝi kantisto. Por si mem."

La frazo "Por si mem" estas notinda. Oni ne vivas por iu alio; ne por la socio aŭ ŝtato, ne por ajnaj organizoj aŭ grupoj da homoj, kaj eĉ ne por sia familio, mi pensas. Post ĉio oni devas vivi por si mem laŭ sia plaĉo, laŭ sia ideo, laŭ sia maniero, laŭ sia kapablo, kaj laŭ sia volo.

Fine Eva reiris al hejmo. Ĉe la pordo, per "rezoluta tono" ŝi anoncis: "Mi revenas hejmen." Tiu "tono" trankviligas ne nur ŝian familion, sed eble ankaŭ la legantojn. Ŝi trovis grandan esperon en si mem. Ŝi ekpaŝis sur sian vojon al adoltiĝo per sia propra volo. Jen, "Alaŭdo kantas" libervole.

En la novelo aperis minimuma nombro da karakteroj. Ties intrigo ne estas stranga aŭ kurioza, nek komplika. Nenia aventuro, nenia suspenso troviĝas en la rakonto. Por kompreni ĝin oni ne bezonas cerbumi pri sciencaj teorioj aŭ terminoj. La priskribitaj aferoj estas facile imageblaj al legantoj. Eblas diri, ke tiu ĉi novelo neniam estas amuza nek komika, sed ĝi estas sufiĉe impresa kaj iom pensiga. Bona legaĵo!

Parenteze, kiam la aŭtoro verkis tiun ĉi novelon? Certe iam antaŭ ol ties eldonjaro 2017. Eble tiam la mondo ne estis en tiom da malordo kiel nun. Sed poste okazis la pandemio, la rusa invado en Ukrainion, kaj severegaj naturkatastrofoj ĉie. Tiuj ĉiuj detruis pacan ĉiutagon de homaj vivoj kaj la mondan ekonomion. La tumulto daŭre prokrastas ilian revigliĝon ankoraŭ nun.

Dum tiu tempodaŭro, ekonomia malegaleco inter malriĉuloj kaj riĉuloj ŝajnas fiksita aŭ eĉ plu pligrandigita. Kaj ĵus pasintjare aperis la nova teknologio, genera AI kiel ChatGPT kaj aliaj similaj. Tio okazigas diskutojn: Kiel oni uzu ilin por profitigi la homaron? Ĝis kiom ili povos anstataŭigi niajn okupojn? Ĉu ni homoj perdos perlaboran pagon? Ĉu la homoj devas forlasi sian memstaran vivon?

Nuna monda situacio similas al tio en la novelo, ĉu ne?

# Pri "Sur bluaj planedoj" - Ĉu nirvano interesis la aŭtoron?

Mizro Iwaya

Tiu ĉi libro estas kolekto de mallongaj noveloj de scienca fikcio. Ĝi estas "aŭtentika" SF, kie aperas kosmoŝipoj kaj eksterteranoj. Ekzistas tiaspecaj homoj kiuj tre amas tian fikcion. Certe tiu ĉi libro tre plaĉos al ili. Miaflanke, mi nur ametas tian SF, sed mi trovis ke la libro estas sufiĉe ĉarma, ĉar ĉiu peco havas sian "frapfinon." Kiam mi legas ĝin, ĉiu peco donas al mi rideton ĉe la fino.

Cetere estas al mi iom strange ke multaj pecoj estas skribitaj en as-modo. Oni kutime legas novelon en is-modo. Mi memoras ke ankaŭ "Mistero Minora" de Ferenc Szilágyi estas en as-modo. Kial tiuj verkistoj preferas prezencon? Mi ne komprenas bone.

La verkinto Laure Patas d'Illiers estas franca inĝeniero virina. Tial mi ofte rimarkas en la libro ke aperas virinoj kiuj ludas ĉefan rolon tie. Eĉ kontraŭherooj estas ofte virinoj. Tia konstruo aspektas freŝa al mi ĉar mi ofte legas verkojn kie aperas viraj protagonistoj. Alia rimarkindaĵo estas ke ŝi traktas ankaŭ seriozan temon en la nuntempa socio. Ne nur amuza, sed ankaŭ pensiga estas ŝia verko. Mi donas ekzemplojn de tia seriozeco: "15. Alaŭdo kantas" kaj "19. Ĉe tiaj uloj".

La unua estas detale diskutita en la kunsido, tial mi volas diskuti ĉi tie pri la dua peco. Skiza historio de la verko estas jena. Elizabeth, ĝendarmo, iris al la aktuala loko de la mortinto laŭ la ricevita informo. La unua trovinto estis Camille Pezon, kiu loĝas en serena distrikto de la urbo. Ŝi ŝatas serenecon sed ŝia filino Lea ne obeas ŝin kaj eĉ inklinas al drogo. Post la enketo klariĝis ke la amiko de Lea mortis pro drogo kaj ŝi lasis la kadavron tie. Ŝi agis tiel ĉar ŝi deziris rompi la serenecon de la distrikto. Post la finraporto de la kazo, Elizabeth mem deziris partopreni en la serena vivo.

En la verko la aŭtoro mem menciis: La Budao (Budho) asertis ke sufero naskiĝas el deziro. Jes, la vivo en la serena distrikto estas kvazaŭ en nirvano; ĉiam serena sen superflua deziro. Ĉiuj loĝantoj vivas en seretonina trankvilo. Tia stato estas kontentiga por maljunuloj, sed por junuloj ne. Junuloj deziras havi pli viglan socion, nome Sukavaton, kie oni havas dopaminan ĝojplenan vivon. Kion ili povas fari en nirvana socio? Jes, drogo! Tiamaniere junuloj komencis utiligi drogon, kaj la sekvo estas kiel kutime: morto pro troa dozo.

Tia konflikto inter maljunuloj kaj junuloj estas ofte trovebla en la socio. Ni ne havas kompletan solvon. Ni devas atenteme kontroli la agemon de la junuloj. Ni ne devas ĝin senigi ĉar tia agemo estas motoro de socia kresko. Sen ĝi la socio estas certe stagna. Mi kredas ke la aŭtoro desegnis tian kontraŭdiron en la socio. Kredeble ŝi estas kristano kaj, malgraŭ tio, interesita de la budha nirvano. Ĉu tio signifas ke ŝi estas jam sufiĉe matura?

**sezonvorto oktobra**

## Sporta Tago

**Okita Kazumi**

Antaŭe la 10-a de oktobro estis “Tago de fizika eduko”, memore de la malferma ceremonio de la Tokiaj Olimpikoj en 1964.

Tamen, ekde la jaro 2020 la dato ŝanĝiĝis al la dua lundo de oktobro kaj ankaŭ la nomo al “Sporta Tago”.

La celo de tiu ĉi tago estas ĝui sporton kaj kulturi la spiriton de respekto al aliaj personoj, kaj esperi la realigon de sana kaj vigla socio.

En tiu tago okazas sportaj eventoj en diversaj lokoj de la tuta lando.

